

La Dek unu Ordonoj por la Dudek unua Jarcento

Ĉu kristanoj devas obei la Dek Ordonojn, kiuj troviĝas en Eliro 20 kaj Readmono 5? La apostolo Paŭlo deklaris, ke ni ne devas observi la leĝon de Moseo:

“... miaj fratoj, vi ... mortis al la leĝo per la korpo de Kristo, por kuniĝi kun alia ... ni jam liberiĝis el la leĝo ...” Rom.7:4-6

Li skribis al la galatoj por tion klarigi:

“... ke neniu praviĝas antaŭ Dio per la leĝo, estas evidente; ĉar: la virtulo vivos per fido; kaj la leĝo ne rilatas al fido ... la leĝo fariĝis nia pedagogo, kondukante al Kristo ...sed nun, post kiam la fido alvenis, ni jam ne estas sub pedagogo.” Gal.3:11-12; 24-25

Tamen Jesuo diris, ke li venis ne por detriu la leĝon sed por ĝin plenumi (Mt.5:17-20). La Fariseoj opiniis, ke ili atingos savon per preciza observado de la leĝo, sed Jesuo klarigis, ke nia justeco devas superi tion de la Fariseoj, alie ni ne eniros en la regnon de la ĉielo (Mt.5:20). Kiel ekzemplo li diris, ke kiam la leĝo diras ‘Ne mortigu’, li diras ‘Ne koleru’ (v.21-26). Estas interese rimarki, ke la Nova Testamento citas ĉiujn el la dek ordonojn kiel ankoraŭ aplikeblajn krom la kvara - tiu pri la Sabato (Mt.19:18-19; Rom.13:9).

Ni esploru laŭvice la ordonojn:

1. Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi

La judoj dum multaj jarcentoj tre ofte cedis al tento adori idolojn same kiel la paganaj nacioj. Sed post la elpatrujigo en Babelon ili fine ŝajnis forigi tiun emon, kaj antaŭ la tempo de la Nova testamento ili jam forte subtenis la ‘*unuan grandan ordonon ... la Eternulo, nia Dio ... estas unu.*’ (Mt.22:35-40, Mk.12:28-30). Sed laŭ ilia ideo, Dio estas tiel malproksima de ni, ke Li preskaŭ ne havas ian rilaton al ni, koncepto, kiu alproksimiĝas al la islama ideo pri Alaho. Pro tio estis tre malfacile por ili akcepti, ke Jesuo estas la Filo de Dio, kvankam la fakto de la releviĝo pravas tiun pretendon. Kaj Jesuo kaj Paŭlo montris, ke kiam li pretendis esti la Filo de Dio, Jesuo ne blasfemis, ĉar li ĉiam estis, estas kaj estos submetita al Dio (Jn.14:28; 1Kor.15:24-28).

Ni, en la 21-a jarcento povas uzi la saman rezonadon por montri, ke la doktrino de la Triunuo ne akordas al la faktoj. Estas fakto, ke kredi, ke Dio mortis dum Dio restis vivanta, estas kredi al du Dioj. La doktrino de la Triunuo malobservas la unuan ordonon. Dio ne estis konata kiel Patro en la Malnova Testamento; nur post la naskiĝo de Sia Filo per la potenco de la Sankta Spirito sur Maria Li fariĝis al ni Patro.

Ni devas nin demandi ĉu ni vere adoras la sole veran Dion, kaj Lin sole. Oni povas tro facile anstataŭigi la sole veran Dion per falsaj dioj, sen konscie malkonfesi Lin. Falsaj dioj estas tiel ofte nun, kiel en iu alia tempo. Se ni ne legas tion, kion Dio malkaŝis pri Si en Sia vorto, ni riskas adori alian dion, kiun ni mem imagas. Jesuo diris “... *jen estas la eterna vivo ... koni Vin, la sole veran Dion, kaj tiun, kiun Vi sendis, Jesuon Kriston.*” (Jn.17:3) Paŭlo skribis “... *por ni estas unu Dio, la Patro ... kaj unu Sinjoro, Jesuo Kristo.*” (1Kor.8:1-6) Johano aldonis “*Infanetoj, gardu vin kontraŭ idoloj.*” (1Jn.5:20-21)

2. Ne faru al vi ian idolon

Homoj inklinas adori tion, kion ili povas vidi. Se ili faras ian figuron, ili poste emas adori ĝin, kvankam la unua celo ne estis fari idolon. Ekzemple Moseo, laŭ la ordono de Dio, faris kupran serpenton por ke la Izraelidoj povu ekrigardi ĝin kiam morditaj de serpento. Tiu figuro estis bildo de homa senpotenco kaj de la volonteco de Dio resanigi ilin. (Nom.21:4-9) Ĝi ankaŭ estas taŭga paralelaĵo al la morto de Jesuo sur la kruco por savi pekantojn. (Jn.3:14-15) Sed antaŭ la tempo de la reĝo Ĥizkija ĝi jam fariĝis idola abomenaĵo. (2Reĝ.18:1-4)

Evidentaj ekzemploj de tio en la nuna mondo estas la statuoj, ikonoj kaj krucoj en preĝejoj tra la tuta mondo. Tamen antaŭ ol tro memvitiĝi, ni sinesploru por eltrovi ĉu ankaŭ ni posedas idolojn. Ĉiu monero portas figuron - ĉu ni elspezas tro multe da nia tempo kaj forto akiri riĉaĵojn?

Pripensu la nuntempajn modkantistojn kaj futbalantojn popularajn. En la angla lingvo ili eĉ nomiĝas 'idoloj'. Sub la alloga ceremoniaĵo de la 'ĉefpastroj' de komerco kaj komunikiloj, tiuj idoloj dronigas junajn mensojn kaj servutigas ilin. La figuroj estas presitaj, surekranigitaj aŭ eĉ lasero-lumigitaj anstataŭ fanditaj aŭ ĉizitaj, sed ili tamen estas figuroj.

Fakte io ajn, kion ni amas pli ol Dio estas idolo, ĉu hejmo, hobbio, dorlota besto, infano aŭ iu ajn aliaĵo. Krome se ni adoras tiajn idolojn, ni adoras nin mem - tio estas la plej malbona idolservado. Kontraŭ tio neniu el ni povas esti imuna.

3. Ne malbonuzu la Nomon de la Eternulo, via Dio

La Eternulo ordonis tre severan punon al iu, kiu insultis Lian nomon kaj blasfemis, (Lev.24:10-23) kaj Jesuo donis al ni la plej severan averton, ke blasfemo kontraŭ la Sankta Spirito neniam estos pardonita (Mt.12:22-37). Tiu citaĵo montras, ke ni blasfemas kiam ni atribuas la agojn de Dio al iu alia.

En la nuna mondo ni aŭdas ĉiutage la nomojn de Dio kaj Jesuo uzatajn kiel esprimoj de kolero, surprizo kaj ĉagreno, kio ankaŭ estas fakte malbonuzo de sanktaĵoj. Prefere oni uzu nekondamneblajn vortojn (Tito2:6-8). Se ni preĝas "*Via nomo estu sanktigita*" (Mt.6:9) ni devas ne poste malbonuzi tiun nomon. Bona konsilo estas: "Se estas dubo, ne uzu!"

4. Memoru pri la tago Sabata, ke vi tenu ĝin Sankta

En la tempo de la servado de Jesuo, kaj eĉ ĝis la nuna tempo, la Judoj aldonis multajn detalojn al tiu leĝo, difinante precize tion, kion oni devas ne fari sabate. Estas evidente, ke Jesuo tute malatentis tion, kion ili aldonis (Mt.12:1-12; Lk.13:10-16; 14:1-5; Jn.5:8-18 ktp). Li deklaris, ke li estas "*Sinjoro de la sabato*" (Mt.12:8) kaj, ke "*la sabato estiĝis por la homo, kaj ne la homo por la sabato.*" (Mk.2:27)

Por kristanoj do, ĉu dimanĉo nun anstataŭas la sabaton? Certe ŝajnas, ke dum la unua jarcento la kredantoj kutime kunvenis dimanĉe por dispecigi panon laŭ la ordono de Jesuo (Ag.20:7; 1Kor. 16:2), kvankam nenie troviĝas iu ordono de Jesuo pri tiu tago. Tute male, ĉar Paŭlo emfazis, ke ne ekzistas iu tago, kiu gravas pli ol alia (Rom.14:12; Gal.4:8-11; Kol.2:16-17),

kaj la apostoloj ordonis, ke la ne-hebreaĵ kredantoj ne devas obei la leĝon de Moseo (Ag.15:1-21; 16:4).

Ĉu do la kvara ordono estas escepto? Ĉu la hodiaŭaj kredantoj neniel devas observi ĝin? Koncerne tion ni notu, ke la kialo, kiun Dio donis por ĉi tiu ordono estas ‘por ripozi’. En Hebreoj 4:3,9 kaj 10 ni legas, ke ni devas ripozi de niaj faroj same kiel Dio ripozis de Siaj. Tiamaniere ni ekkomprenas, ke ĉi tiu ordono ne estas escepto. La plenumo plivastigas ĝin, same kiel la aliajn. La kredanto devas jam ne fari sian propran laboron sed la laboron de Dio ĉiutage dum sia tuta vivo. Ĉiuj tagoj egalas, sed ili devas ne esti egale sekularaj; ĉiuj el ili devas esti sanktigitaj. Nia tuta vivo estu por Dio, kaj kion ajn ni faras, tio estu “... *en la nomo de la Sinjoro.*” (Kol.3:17)

5. Respektu vian patron kaj vian patrinon

Ĉi tiu estas la dua el nur du pozitivaj ordonoj, kaj ĝi estas priskribita de Paŭlo kiel “.. *la unua ordono kun promeso*” (Efes.6:1-3). Jesuo mem observis ĝin (Lk.2:51) kvankam li ne silentis kiam la deziro de Maria kontraŭis al la volo de Dio, la vera Patro de Jesuo (Mt.12:46-50; Mk.3:21; 31-35). Se infanoj ne lernas obei siajn gepatrojn kaj agnoski ilian aŭtoritaton, ili ne agnoskos la aŭtoritaton de Dio. Iu ajn socio, kiu perdas la koncepton de aŭtoritato, la volontecon obei, disiĝos kiel jam estas videbla, almenaŭ en okcidentaj landoj. Antaŭ nelonge iu skribis “La gejunuloj hodiaŭaj malakceptas religion ne ĉar ili ne povas kredi la doktrinojn, sed ĉar ili ne povas akcepti la koncepton de aŭtoritato.”

Aliflanke gepatroj devas agi ame al siaj infanoj, same kiel Dio agas al ni, por ke la infanoj ne ĉagreniĝu (Efes.6:1-3). Sed nia devo respekti niajn gepatrojn ne finiĝas kiam ni plenkreskiĝas. La Nova Testamento klare reasertas la devojn donitajn en la Malnova (Mk.7:9-13; 1Tim.5:4-8). Denove Jesuo mem montris al ni per sia konduto al sia vera Patro kiamaniere ni devas agi. Jesuo ĉiam obeis Dion (Jn.8:49; 10:17-18; 14:31; 15:10), kaj Dio estas super li (1Kor.11:3). Tiuj, kiuj kredas al la doktrino de la Triunuo videble ne povas kredi, ke “... *la kapo de Kristo estas Dio*”, tiamaniere vanigante ankaŭ ĉi tiun ordonon de Dio “... *per sia tradicio.*” (Mk.7:13) Eĉ estontece Jesuo “... *estos submetita...*” al Dio (1Kor.15:28).

6. Ne mortigu

Komence necesas klarigi, ke tiu ĉi ordono temas pri murdo, ne pri juĝista mortpuno. La du hebreaĵ vortoj estas tute malsimilaj. Estas evidente, ke la leĝo de Moseo ordonis mortpunon pro diversaj pekoj kaj, ke Dio ordonis la tutan detruon de malpiaj nacioj (El.21:12-17; Read. 20:16-18; 9:3-4). Tiu ĉi ordono tute malpermesas privatan venĝon, la mortigon de iu homo por persona celo.

Denove estas klare, ke Jesuo plivastigis ĉi tiun ordonon (Mt.5:21-22) dirante, ke ni eĉ ne koleru. Plue li ŝajnas sugesti, ke laŭ la juĝo de Dio, uzi la esprimojn de malestimo ‘Raka’ aŭ ‘Malsaĝulo’ povas esti egale malbone kiel murdo. Jesuo kondukas niajn pensojn al la radikaj kaŭzoj de nia kolero - envio, ambicio kaj vundita fiero - kiuj sin esprimas per kalumnaĵoj kaj vundantaj vortoj. Por la disĉiplo do, la sesa ordono fariĝas “ne malamu”. Jesuo tiamaniere

kontraŭas al la tradicio de la Judoj “Amu vian proksimulon kaj malamamikon” (kio ne troviĝas en la leĝo), ordonante, ke ni amu niajn malamikojn (Mt.5:43-48).

7. Ne adultu

Refoje Jesuo plivastigis la amplekson de la Mosea leĝo (Mt.5:27-32). Ne nur la ago sed eĉ la deziro kulpigas homon antaŭ Dio. Jesuo instruis, ke la radika kaŭzo de adulto estas dezirado kaj, ke tiu dezirado estas peko eĉ se mankus al homo aŭ kuraĝo aŭ okazo realigi ĝin. Jakobo montras la sinsekvon, kiu kondukas al morto (Jak.1:14-15).

Adulto estas tuta perfido de edzeco, kaj ni bezonas eviti tuijn situaciojn en kiuj ni povus esti tentataj. En la Biblio edzeco estas figuro de la rilato inter Kristo kaj la eklezio (Efes.5:22-33). Pro tio edzoj kaj edzinoj havas bonan idealon al kiu aspiri, kiu fortigos la ligilon inter ili. Same disĉiploj povas pli bone kompreni, ke kiam ili forlasas lin por adori alian dion, tiam Dio taksas ilin kiel adultulojn. De la komenco edziĝo estas por ĉiam laŭ la leĝo de Dio (Gen.2:24), kaj Jesuo diris “... *kion do Dio kunigis, tion homo ne disigu.*” (Mt.19:3-9)

Eble ni povas pensi eĉ pli profunde pri tiu ĉi afero. Oni povas diversmaniere ŝteli ies edzinon aŭ edzon: forpreni la tempon, intereson, amikecon aŭ subtenon, kiu apartenas al la edz(in)o kaj infanoj de alia homo alproksimiĝas al adulto, eĉ se nenia kontraŭleĝa ago estas intencita. Nuntempe povas okazi, ke dunganto postulas tiom da laboro kaj tempo, ke la laborant(in)o preskaŭ neniam estas hejme, kaj tia afero povas kaŭzi disiĝon de edziĝo. Simile disĉiplo devas sin demandi ĉu ekzistas io ajn, kiu venas inter li/ŝi kaj Kristo.

8. Ne ŝtelu

Kompreneble neni, kiu amas sian proksimulon rabos lin, sed Paŭlo indikas, ke tio ne sufiĉas (Efes.4:28). La ŝtelinto ne nur devas ĉesi ŝteli sed labori por “.. *havi ion por doni al bezonanto.*” La Biblio agnoskas, ke kvankam ĉia ŝtelo estas peko, ne ĉiuj ŝteloj estas egale hontindaj (Sent. 6:30-31). Tamen estas evidente, ke se tiuj, kiuj povus doni manĝaĵon al malsatulo ne fakte donas, ili devas porti iom da kulpo (Jak.2:15-16).

Aliflanke “... *se iu ne volas labori, tiu ankaŭ ne manĝu.*” (2Tes. 3:10-12) Ni vidas do, ke kristano devas esti laŭeble memsubtena kaj nur peti helpon kiam vere necesas, sed ankaŭ devas volonte doni al iu ajn, kiu petas, eĉ se tiu eble ne vere bezonas helpon. Tiu, kiu rifuzas helpi senhavulon kaj tiu, kiu senmerite petas helpon egale ŝtelas.

Sed tio ne estas la tutaĵo. Ĉu ni ne rabas de Dio, prenante nian manĝaĵon, vestaĵojn aŭ alian benon de Dio sen danki al Li? (1Tes.5:18; Rom.1:21) Jesuo diris “*Redonu ... al Dio la proprajon de Dio*” (Mt.22:21), kaj al Dio apartenas ĉio. Kiam ajn ni prenas ion sen danko al Dio ni ŝtelas.

9. Ne parolu ... malveran ateston

La Mosea leĝo ordonis tre severan punon pro malvera atesto (Read.19:15-21), kaj malvera atesto estas unu el la sep aferoj, kiujn la Eternulo malamas (Sent.6:16-19). Sendube neni el ni

iam mensogis pri iu en kortumo, sed ĉu ne iam flustris ian kalumnon aŭ duonveron pri iu, kiu ne plaĉas al ni - aŭ kiu malestimas nin? Rimarku la sepan aferon: "... *tiu, kiu semas malpacon inter fratoj.*" Jakobo avertas nin kiel malfacile estas por la homoj regi la langon (Jak.2:26; 3:2-18), kaj Petro diris, ke nur perfekta homo sukcesas (1Pet.2:21-22). Tiu perfekta homo, Jesuo, gvidas nin al la koro de la problemo "... *el la koro eliras ... falsatestoj ...*" (Mt.15:17-20). Por regi sian langon homo devas esti pura en la koro. Niaj vortoj malkaŝas niajn korojn (Mt.12:34-37).

10. Ne deziru

Ĉi tiu ordono malsimilas al la aliaj ĉar ĝi temas pri pensoj, ne agoj; neniu juĝisto povas kondamni homon kulpa ja deziro. Ĝi fakte enhavas ĉiujn ordonojn ĉar iu, kiu deziras la edzinon de aliulo kaj prenas ŝin malobservas la sepan ordonon. Tiu, kiu deziras iun havaĵon de najbaro kaj ekposedas ĝin kulpigas je la oka. Se iu, por plenumi iun deziron, murdus, li malobservus la sesan, kaj se, por realigi tiun murdon, li devas malatesti, li malobeas la naŭan. Kiam infanoj deziras agi kontraŭ la konsilo de siaj gepatroj kaj realigas tiun deziron, ili malobeas la kvinan ordonon. Izrael ne volis perdi la komercadon eĉ de unu tago, do ili rifuzis observi la kvaran ordonon rilate la sabaton.

La hodiaŭa situacio similas. Paŭlo diris, ke avideco estas idolkulto (Kol.3:5). Homoj ĉiam volas plenumi siajn dezirojn, tiamaniere adorante sin mem anstataŭ Dio. Homa fiereco ĉiam emas adori la memon kaj volas superregi ĉiujn aliajn. Jakobo bone esprimis la aferon: "*De kie militoj... el inter vi? ... vi deziras ...*" (Jak.4:1-3)

Eĉ se ni sukcesus obei la aliajn ordonojn, neniu el ni povus pretendi, ke ni obeas la dekan, tial ni ĉiuj meritas morton (Rom.6:23). Ni venu do al --

La dekunua ordono

Jesuo diris "*Novan ordonon me donas al vi, ke vi amu unu alian.*" (Jn.13:34-35) Tio donas provilon pri vera disĉipleco - "*Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia.*"

Se ni pripensas la historion ni devas konfesi, ke plejparte la kristanaro malsukcesis je tiu provo. Pli da malamo montriĝis en la nomo de kristanismo ol en iu alia religio, eĉ (almenaŭ ĝis lastatempe) islama fundamentismo. Sekvas, ke iu eklezio aŭ individuo, kiu malamas iun homon ne estas vere kristana. La persekuto, perforto aŭ malamo kontraŭas al la tuta leĝo. Verdire ĝi ne estas nova ordono ĉar Jesuo citis ĝin el la Malnova testamento: "...*amu la Eternulon, vian Dion ... Amu vian proksimulon ... Pli granda ol ĉi tiuj ne estas alia ordono.*" (Mk.12:28-31; Read.6:4; Lev.19:18) Se ni vere amas Dion ni ja amos unu alian. Jesuo mem donis al ni la superegan ekzemplon: "*Neniu havas pli grandan amon ol tio, ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj.*" (Jn.15:12-14)

(Mi multon ĉerpis el la anglalingva libro de A.D.Norris 'The Ten Commandments in the Twentieth Century'. kaj verkaĵo de R.F.Field, kies volontajn konsentojn mi danke agnoskas.) Jean Field